Bulteno de la **Londona Esperanto-Klubo** 2018 marto-aprilo

## Kluba Programo:

**marto:**

2 Diskuto: *Kion vi faras por informi pri Esperanto?* (IBIS Shoreditch)

9 EKSTERMU !!! *Poramuza "proceso" kontraŭ abomenataĵoj.*
Prezidos Terry Page (Dioramo)
(1800h: konsilantaro)

16 Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)

23 Jarkunsido (Dioramo)

30 *Sankta Vendredo* (neniu kunveno)

**aprilo:**

6 Libera diskuto (sen anoncita temo) (IBIS Shoreditch)

13 *anoncota* (Dioramo)
(1800h: konsilantaro)

20 Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)

27 John Wells – *Lingva Seminario* (Dioramo)

**majo:**

4 Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)

## Esperanta Kalendaro:

13-17 aprilo 2018: Brita Kongreso – Morlan Centre, Aberystwyth, Kimrio. http://britakongreso.org
28 jul – 4 aŭg 2018: 103a Universala Kongreso de Esperanto – Lisbono, Portugalio, http://uea.org/kongresoj

Vidu www.eventoj.hu/kalendaro.htm por ampleksa listo de renkontiĝoj.

## Aliaj anoncoj:

*Prezentu ĉefprogrameron! Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.*

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 22a aprilo por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*




"Kajto" kun klubanoj dum prezento 23 februaro – vidu ankaŭ paĝo 2.

*(foto: Olga Kerziouk)*

## KIO VIN PLEJ FORTE ĜENAS?

Nia programero de 9a marto pritraktos (kvankam ne tro serioze) ĉi-supran gravan temon. Por efike partopreni en ĝi, bonvolu vin pretigi ĉi tiel:

1. Elektu ion (objekton, kutimon, esprimon, verkon k.s.) kiu ege vin ĝenas. (Espereble iuj elektos ĝenantaĵon el la mondo Esperantisma, sed estas neniel devige tion fari.)
2. Pripensu, kaj eventuale skribe notu, konvinkajn motivojn por kondamni tion al tuja ekstermo.
3. Preparu ion materian, ne tre grandan, kiu simbolas ĝin, ekzemple maketon, foton, desegnaĵon aŭ (minimume!) ĝian nomon, grandlitere skribitan sur karton.
4. Venu kun tio al la klubo je vendredo la 9a de marto, kaj provu konvinki la klubanaron, ke vi ja pravas.

Dum vi provos ilin konvinki, t.n. "advokato de l' diablo" kontraŭos viajn dirojn, kun celo persvadi la publikon, ke koncerna ĝenataĵo estas tamen ial konservinda. Finfine via simbolo eniros aŭ "Ekstermilon" aŭ "Konservujon", laŭ juĝo de ĉeestantoj. Bonŝancon!

[*Ajna simileco de ĉi tiu ludo al televid-spektaklo "*Room 101*" estas neniel senintenca*.]

Terry Page

## LEK bonvenigas novajn membrojn

Aliĝis lastatempe al Londona Esperanto-Klubo Oleksandra (Saŝa) Kovjazina, Magnus Henoch kaj Maurizio Giacometto. Ilin ĉiujn ni varme bonvenigas, kaj esperas dividi kun ili multajn agrablajn klub-vesperojn.

